

Gaje kantu ĉiuj ni

LASST UNS FROH UND MUNTER SEIN

S-ta Nikolao



1. Ga - je kan - tu__ ĉi - uj ni. Ko - re ĝo - ju__ ni en Di'.
2. Dum la nok - to__ ve - nos li, jam te - le - ron me - tis mi.



Ve - nos Sank - ta__ Ni - ko - la'. Ve - nos Sank - ta__ Ni - ko - la'.

3. Kaj dormante songâs mi, / ke dolĉaĵojn donas li.
... Venas ...
4. El la lito kuras mi / al teler', kaj plenas ĝi.
... Venis ...
5. Riĉe vi regalis nin. / Do ni ĉiuj danku vin.
Dankon! Dankon! Trala lala la!
Dankon, Sankta Nikola'! / Dankon, Sankta Nikola'!

LASST UNS FROH UND MUNTER SEIN • M (Lasst uns froh und munter sein) kaj
germana T: popolaj • E: Manfred Retzlaff (1938-2018) / Albrecht Kronenberger
2024-11-26

Jen la origina traduko de Manfred Retzlaff:

1. Gajaj estu ĉiuj ni, / ĝoju ni pri nia Di'!
Ĝoju, ĝoju, tralalalala!
Baldaŭ venos Nikola', / baldaŭ venos Nikola'.
2. Dum la nokto venos li, / la teleron metas mi.
3. Kaj dormante songâs mi: / Dolĉajn aĵojn donas li.
... Venas Sankta Nikola' ...
4. El la lito kuras mi / al teler', ĉu plenas ĝi.
(Ekstarinte vidas mi, / ke jam venis tiu ĉi.)
... Venis Sankta Nikola' ...
5. Ĉiuj devas danki lin, / ĉar li regalegis nin.
... Venis Sankta Nikola' ...

Jen la sama kanto en la traduko de Joachim Giessner:

1. Baldaŭ sopirata tag', / Nikola' kun sia ag'.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
baldaŭ venos Nikola', / baldaŭ venos Nikola'.
2. Ŝuon mi pretigos ja, / ĝin plenigos Nikola'.
3. Ofte sonĝas nokte mi, / kion eble donos li.
4. Frue mi rigardos, ĉu / estos io en la ŝu'.
5. Nikola' mi dankas vin, / ĉar vi tre ĝojigis min.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
nun jam venis Nikola', / nun jam venis Nikola'.

LASST UNS FROH UND MUNTER SEIN • E: Joachim Giessner (1913-2003), en Josef Schiffer, *Mia Kantaro I*, 5a eldono 2001, n. 88

*Krome ekzistas traduko de Josef Kühnel
en Josef Schiffer, Mia Kantaro I, 1a eldono 1996, n. 88*

Jen la germana originalo:

1. *Lasst uns froh und munter sein
und uns recht von Herzen freun!
(und uns in dem Herrn erfreun!)*

*Lustig, lustig, traleralera!
Bald ist Nikolausabend da,
bald ist Nikolausabend da!*
2. *Dann stell' ich den Teller auf,
Nik'laus legt gewiss was drauf.*
3. *Wenn ich schlaf', dann träume ich,
jetzt bringt Nik'laus was für mich.*
4. *Wenn ich aufgestanden bin,
lauf' ich schnell zum Teller hin.*
5. *Nik'laus ist ein guter Mann,
dem man nicht g'nug danken kann.*

*el Wikipedia
tie ankaŭ indikoj pri variantoj*